# Novjorka Prismo

Numero 122 — Marto 2003

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia marta kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 21-an de marto 2003, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Thomas Eccardt prelegos pri *Semiotiko: Patrino de Lingvistiko.* ★

## Protokolo de la kunveno de la 21-a de februaro 2003

Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon je la sepa horo ptm. Ĉeestis 15 personoj, kvar inter ili la unuan fojon: Ruben CONTE, kiu naskiĝis en Argentino kaj nun loĝas en Italio; Noemi CONSECO, amikino de Ruben; Chuck YOUSE, studanto de Tomaso; kaj Suzanne May SCHNEIDER, profesia muzikistino kaj stifpatrino de Jake SCHNEIDER.

Rochelle F. GROSSMAN proponis la jenajn korektaĵojn por la pasintmonata protokolo: 15 personoj ĉeestis la kunvenon; la patro kaj filo el Francio intencas viziti Novjorkon ĉi-jare; kaj ŝi ricevis leteron de la Korea Respubliko. Rochelle ankaŭ rimarkis pri la misliterumado de la nomo 'Stanley' en la artikolo pri la koncerto de Jon LIECHTY. Tomaso diris, ke li respondecas por la tajperaro. Tuj poste, la protokolo estis akceptata.

Rochelle ricevis du artikolojn: unu el Pollando, skribita en la germana, pri la sentoj de la aŭtoro kontraŭ la oficiala uzo de la angla en la Eŭropa Unio; kaj alia de Dragomir LIVIC, skribita sub la nomo Miro LEVANTE, pri Kontraŭbudismo, religio, kiun li mem kreis.

Alex KARKOVSKY, esprimis sian opinion, ke rusaj verkistoj, kiel Nabokov, povas verki bonegajn verkojn en la angla, sed estas malfacile por nerusaj verkistoj verki bonegajn verkojn en la rusa.

Je la sepa horo kaj kvarono ptm George BAKER komencis sian prelegon pri la konstruado de pontoj. Li havis diapozitivojn por montri la diversajn specojn de pontoj. La problemo estis, ke ni ne havis la ĝustan projekciilon por diapozitivoj. Ni nur havis superkapan projekciilon por travideblaĵoj. Ni demandis al ni mem, "Kiel li povos montri al ni la bildojn?" George prenis la projekciilon al la malantaŭa parto de la ĉambro, fokusis la projekciilon, kaj metis ĉiun diapozitivon sur la projekciilon individue kaj mane, por montri unu post la alia. Ĉu oni estu surprizita de tia inteligenta solvo? Tute ne, ĉar George estas inĝeniero!



George prelegis pri la diversaj stiloj de pontoj proponitaj por kunligi San-Franciskon kaj Oaklandon, du grandaj urboj en Kalifornio. La problemo estis, ke en la jaro 1989 okazis tertremo, kiu damaĝis la ekzistantan ponton, kaj la registaro devis decidi pri la speco de ponto konstruota. George diskutis pri la aranĝo de kabloj kaj turoj, kaj la subtenado de la pezo de la ponto. Unu parto de la projekto kunligos San-Franciskon kaj insuleton Yerba-Buena, kaj alia parto kunligos Yerba-Buenan kaj Oaklandon. La nova ponto havos 12 vojojn, po ses vojoj ĉiun direkton.

George finis sian prelegon je 7:50 ptm. Post la prelego kelkaj personoj parolis kun George neformale pri la temo de la prelego, dum aliaj personoj interparolis pri aliaj temoj.

La kunveno finiĝis je la oka kaj duono ptm, multe pli frue ol kutime. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj, sed ne tiom, kiom kutimas, iris al la restoracio-manĝaĵvendejo Emma's Dilemma por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## La organizantoj de la 51-a jarkongreso de ELNA invitas vin al Bostono!

**Vi ne volos maltrafi ĉi tiun kongreson!**

Partoprenos Humphrey Tonkin, pasinta prezidanto de UEA kaj aktivulo de JEN (Junularo Esperantista Nordamerika) en la 60-aj jaroj.



Koncertos Esperanto-muzikistoj JoMo (el Francio kaj de la grupo JoMo kaj Liberecanoj) kaj Kimo (el Danlando kaj de la grupoj Amplifiki kaj Esperanto Desperado)


Partoprenos eksterlandaj Esperantistoj! Multaj eksterlandanoj venos al la kursaro NASK en Vermonto kaj partoprenos la kongreson survoje. Jam venis aliĝiloj de Ĉinio kaj Niĝerio! Ni provas inviti la instruistojn de la kursaro, do eble partoprenos la fama kroata aŭtorino Spomenka Ŝtimec kaj profesoro Paul Gubbins, sed ni ankoraŭ ne povas garantii tion.

**Do venu!**
**Vi lernos, festos, kaj amikiĝos!**

Pli da informoj ĉe la kongresa TTT-ejo: *http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2003/*

**Kiam:** 3-6 julio 2003

**Kie:** La Masaĉuseca Instituto de Teknologio (MIT) en Cambridge, Massachusetts, Usono, tuj apud Bostono.



Studentaj ĉambroj lueblas por malmultekostigi la vojaĝon, sed ankaŭ tre bonaj hotelprezoj por Bostono. Do se vi iam volis viziti Bostonon, Kembriĝon, aŭ MIT-n, nun estas la oportuno! ★

– *Jacob B. SCHWARTZ*

(Fotoj el *masstraveljournal.com*)

---

## Tro facila, kaj pro tio . . . danĝera

*Ankoraŭ unu anekdoto el reala vivo. S.N. Podkaminer (1901-1983) estis Esperanta aktivulo de 1920 ĝis lia morto. Romanov estis la unua sekretario de KP en Leningrado (nun Sankt-Petersburg).*

– *Alex KARKOVSKY*

Unu foje Semjon Podkaminer, arda esperantisto kaj eksa kolonelo de NKVD (soveta gestapo) flugis per speciala aviadilo al Moskvo. En ĝi troviĝis iu Romanov, membro de Politburoo, ĉefo (gaulajter) de Leningrado. Li ekvidis la verdan stelon surbruste de Podkaminer.

— Do, vi parolas Esperanton. Tamen uzante tiun lingvon ege facile spioni.

Podkaminer malkonsentis. Li diris, ke pli sukcese spioni angle, ĝin parolas multaj milionoj.

— Ne, la angla ne taŭgas. Homoj studas ĝin dum multaj jaroj kaj poste apenaŭ balbutas. Diabla lingvo!

— Do Esperanto estas pli facila?

— Sendube. Mi ordonis alporti lernolibron de Esperanto. Post kelkaj lecionoj mi jam povis legi Esperante . . . Danĝera, vere danĝera lingvo. Stalin samopiniis.

Podkaminer ne daŭrigis la disputon. ★

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Marto 2003** — **21**

**ESNY KUNVENO**
*Semiotiko: Patrino de Lingvistiko*
Prelego de Thomas Eccardt
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Aprilo** — **6**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 123)


**18**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)**
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Volas korespondi el Nepalo



Estimata samideanoj de novjorko, Saluton! Mi estas Navin de Kathmandu, Nepal. Mi volas amikumi kaj esperantumi. Mi volas legi de tempo al tempo. Bonvolu skribi al mi poŝte. Bonvolu sendi foton kaj organojn se eblas. Miaj hobioj estas instruado, bildkartoj, komputilo, legado, vojaĝado, bildoj. Mi dankas vin antaŭe sed mi ne volas ĝeni. ★

*Navin Lal Shrestha,*
*GPO BOX 11753,*
*Kathmandu, NEPAL*

## IBM Plaza

La duan de marto, la vetero estis aĉa, tial nur kvin gessperantistoj kunvenis ĉe IBM Plaza – sed kiel kutime oni ĝojis diskuti pri multaj interesaj aferoj, i.a. la nova art-ekspozicio de Picasso kaj Matisse ĉe MoMA Queens. ★

– *Chuck YOUSE*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Suskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 122 – Marto 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2003 Esperanto Society of New York